

HEJS JUNED

HISPANA ESPERANTISTA
JUNULARA SOCIETO

ATOCHA 98 - 4.
TELF. 230 87 98
MADRID - 12
HISPANIO

junio N-RO
1984 121



Redaktoroj:
G. KAMAĈO K RIKARDO F.A.R.

NE PRELEGU
NEPRE LEGU

Enhavo

Paĝo	1	Rajto: sin mem nutri
"	2	Vidu mem
"	3	Mam-prezento
"	4	Krucvortenigm'. Lastminuta informo
"	5ñ..	Sandokano
"	6	Pensoj de Ŝekspiro
"	7	Tristano kaj Izolda
"	11q.....	Rebuso
"	12	Fotoj el Kordovo
"	14	Kino: Projekto Gerboŝtormo
"	16	.w.....	E-Komunumoj
"	17	La Sep Lertaj Dancantoj
"	22Y.	HEJS--Paŭno
"	23	Diversaĵoj
"	24	Fotoj faritaj de esperantistoj

KUNLABORANTOJ: La fotinto (Miguel A. Sancho), Valadolidano, L' Unuopo, Sandokano, Kama-ĉ, Ana María Ranero, R. Filipino A.R., Ekstremadurano, Irokeza tribo; kunlaboras, sed ne en HEJS-Juneco, Bernard Golden.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn-por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.

MAM-PREZENTO* DE LA DUONE NOVA REDAKCIO



Olda mi estas,
sed oni ne nomas
min Ŭilm aŭ
Vilĉjo, ĉar mi
nomiĝas Georgo
Kamaĉo. Mi ne
estas stulta,
tamen mi ree
laboras en la
revuo...


Saluton! Mi estas
Rikardo Filipo Albert
Rejna, sed ĉi-okaze
Georgo parolas nome
de mi. Mi ne estas
idioto, sed mi akceptis
tajpi, redakti kaj fari
aliojn por la revuo...

* Pardonu: mem-prezento!



**MI ESTAS GLANULO.
MI ESPERAS, KE LA
REVUO ESTOS KIEL
MI: SIMPLA SED NUTRA**

(Ĉi tion ni ricevis el Valadolido)



KIRILO VORT IE IN IIGIM'

HORIZONTALA: A) Esperantigita nom' de la kreinto de lingvo tutmonda/Tempa adverbo B) Konjunkcio/Rilata al monato C) Inverse, plena de truetoj/Kromosoma element' Ĉ) Inverse, indi-


vidu'/Iomete malgranda/Verba finaĵo D) Inverse, besto similanta kuniklon, sed pli granda/Rilata al la subjekto de la propozicio E) Sekse ami/Prepozicio F) Mallongigo de "kaj"/Simbolo de oksigeno/Simbolo de nulo/Nea adverb-interjekcio G) Inverse, ĉina mezurunu' (536,33 metroj)/Romana cifero/Inverse, malsupra ĉeftrabeg' de ŝipo/Finaĵo de la substantivoj Ĝ) Inverse, rilata al gento loĝanta en norda Hispanio/Inverse rilata al leonsimila besto, sed pli malgranda H) Mallongigo de tio, sen kio tre malfacile okazus kongreso/Inverse, fonetike, fondinto de HEJS.


VERTIKALE: 1) Metalo fleksebla, kvankam tre malmola/Pro kio 2) Ĉielblua/Mallongigo de la nomo de Esperanta ajnista revuo, kiu perdas ĉiujare la plej grandan nombron da abonantoj 3) Nedaŭra inklino/Unuo de elektra rezistanco/Inverse, mallongigo de "kaj similaj" 4) Inverse, ia muzika teatr'/Patr' de patro aŭ patri no, inverse 5) Genro de manĝeblaj kaj ornamaj herboj/Du literoj, la prononco de kies nomoj signifas "irejo" 6) Inverse, flava metal'/Irigi rapide antaŭen/Telefona interjekci'/Adjektiva finaĵo 7) Konsonanto/Alia konsonanto/Inverse, virina vest', kiu strikte ĝustigas al la korpo 8) Sunlumŝajna 9) Vaze/Tabelvorton/Grup' 10) Monata'/(Doble kvar)-a.

Kulpas L' Unuopo.

LASTMINUTA INFORMO: (Ne temas pri ŝerco...)

4 HEF RATIFIS NIAN STATUTON!





NE SUBTAKSU
KROKODILON

PENSOJ de FAMULO



PRAKTIKI ESPERANTON AŬ RESTI SURTERE:
JEN LA PROBLEMO!

TRISTANO kaj IZOLDA



"Tristano kaj Izolda" estas mezepoka legendo, kies originoj sin trovas en Kimrio, kaj kiu poste estis almetita al la artura ciklo. La plej aŭtentikaj adaptaĵoj de la originala legendo estas tiuj de la anglonormanda Bérout kaj la germana Eilhart von Oberge, ambaŭ datigantaj de la XII-a jarcento. La legendo disvastiĝis al la tuta Okcidento, kaj ĝin revalorigis la opero de R. Wagner "Tristan und Isolde" (1865). Jen la legendo:

La reĝo Marko el Kornvalo estis devigata pagi al Irlando grandan tributon. Liaj regatoj tute ne ŝatis ĉi tiun situacion, kiun ili konsideris nejusta, sed ili komprenis, ke ilia reĝo estas tro maljuna por komenci batalon kontraŭ siaj najbaroj. Pro tio ili kontinuis la pagon de l' tributo.

Sed iun tagon Tristano, nevo de la reĝo, forta kaj belaspekta junulo, diris al si, ke estas tempo malaperigi tiun malagrablan situacion, kaj atendis la sendaton de Irlando.

Tiam la irlandanoj sendis Morholt-n, rianĉon de Izolda, filino de la reĝo. Morholt estis viro de giganta korpalteco kaj posedis grandan forton kaj lertecon en uzado de armiloj. Sed ĉi tio ne malkuraĝigis la junan Tristanon, kiu tuj defiis lin.

Ambaŭ iris al soleca insuleto kaj luktis per ĉiuj siaj fortoj. Tamen la juneco, vigleco kaj justeco de lia kaŭzo estis superaj al la bruta forto de la irlanda giganto, kaj Tristano mortigis lin, kvankam li estis konsiderinde vundita dum la lukto.

Tiam Tristano, montrante sian fierecon, sendis la

PRO KE ĜI

kapon de Morholt al Izolda.

Sed la reĝino de Irlando, sperta en magiaj ertoj, ŝmiris la spadrandon de la mortinta luktisto per mistera likvaĵo, kiu venenos la sangon de tiu, kiun ĝi vundos.

Kiam Tristano tion eksciis, li sentis sin nepre kondamnita kaj enŝipiĝis en boato kun kelkaj provizaĵoj kaj liuto, por atendi morton en la soleco kaj silento de la marbordoj de sia lando. Sed forta tempesto ĵetis lin en la strandojn de Irlando, kie la sekvantan matenon Branganja, servistino de Izolda, plena je malamo al la viro, kiu mortigis ŝian fianĉon kaj sendis al ŝi lian kapon, decidis venĝi sin.

Ŝi ordonis, ke oni alportu al ŝi la korpon de Tristano kaj, kiam li kuŝis antaŭ ŝi, ŝi prenis la spadon de l' heroo kaj ĝin levis, por venĝi la morton de Morholt. Sed, tiumomente, Tristano malfermis siajn okulojn kaj rigardis ŝin tiel dolĉe kaj ame, ke Izolda ne havis forton por lin mortigi kaj lasis tiun ideon, sanigante liajn vundojn kaj ŝmirante ilin per la antidoto de l' veneno, kiun uzis la reĝino, ŝia patrino.

Tristano reiris al Kornvalo kaj trovis, ke la korteganoj senĉese intrigis apud la maljuna reĝo Marko, por ke li edziĝu kaj donu heredanton al la lando. Iu tage, kiam la reĝo estis kontemplanta la pejzaĝon de iu fenestro de sia palaco, venis antaŭ li hirundeto kun belega blonda haro en sia beko. La reĝo decidis, ke li nur edziĝos al tiu virino, al kiu apartenas la haro.

-" Reĝa Moŝto- diris Tristano-. Mi scias, kiu estas la posedantino de tiu haro, kaj mi povas alporti al vi la plej belan knabinon el la mondo. Ĝi apartenas al la harero de Izolda, reĝidino de Irlando."

Lia onklo sendis lin kiel ambasadoron por peti la

manon de la princino. Ĝi estis rapide donata, sed Izolda pleniĝis de malfeliĉo, malamo kaj furiozo, kiam ŝi vidis sin denove primokita de tiu belaspekta kaj fiere junulo. Ŝia patrino, la reĝino kaj sorĉistino de Irlando, donacis al ŝi du trinkaĵojn: unu por konservi kaj pligrandigi la amon de sia edzo, la alian por lukti kontraŭ siaj malamikoj.

Dum la vojaĝo, kaj kiam jam vidiĝis la marbordoj de kornvalo, Izolda sendis Branganja-n por se rĉi Tristanon kaj peti de li, ke li iru al ŝia ka juto.

Izolda ne povis sin konsoli antaŭ la indiferen



NE HAVAS KORNOJN:

to de l' junulo, kaj ankaŭ ne povis toleri esti la edzino de maljuna reĝo; do, ŝi decidis veneni Tristanon kaj sin mortigi.

Sed Branganja ŝanĝis la trinkaĵojn kaj donis al ambaŭ amtrinkaĵon, per kiu ili estis kunigitaj en eterna amo.

Jam en Kornvalo, ambaŭ kontinuus la vizitojn unu al la alia, helpate de siaj fidelaj servistoj Kurvenald kaj Branganja. Sed la reĝo iom suspektis kaj ordonis al Melot, ke li gardu ilin senĉese, por trovi la ĝustan momenton por ilin malkovri.

Iun tagon, kiam ili ame dialogis en la ĝardenoj de l' palaco, Melot vidis ilin kaj avertis rapide la reĝon, kiu alkuris senprokraste.

Doloro frapis la koron de l' maljuna monarĥo, ĉar li ne deziris puni la gejunulojn. Tamen, la ambicia Melot, kies envio al Tristano superis ĉion i mageblan, decidis defii lin. Li akceptis la defion kaj, turnante sin al Izolda, la bela knabino kun longaj oraj harplektaĵoj, diris al ŝi:

-" Mi luktos kaj eble mortos. En tiu kazo, mi atendas vin en la lando el kiu oni neniam revenas kaj kie ne eniras la sunradioj."

Kiam ili alvenis al la loko de l' lukto, soleca insulo apud la marbordo, la du luktistoj atakis unu la alian furioze, sed Melot vundis Tristanon kaj tiam ĉi tiu, antaŭ-vidante sian baldaŭan morton, helpate de sia fidela Kurnevald, foriris al la lando de siaj gepatroj.

Dume, Branganja konfesis al la reĝo Marko la tutan veron kaj la monarĥo, malĝojege, alkuris kun Izolda al la loko, kie sin trovis la mortanta Tristano. Gvatisto avertis lin pri la proksimeco de Izolda kaj, dum unu momento, ŝajnis, ke vivo denove venis al lia vizaĝo. Sed li estis tiel senprudenta, ke li forigis la vandojn, kiuj kovris liajn vundojn,

por ke Izolda, kiel antaŭe, senigu ilin.

Kiam ŝi elvenis kaj ĉirkaŭbrakis lin, Tristano ĵus mortis.


Izolda prenis lin forte kontraŭ sia brusto kaj rigardis senĉese lian amatan vizaĝon, ĝis ŝi rememoris "la landon el kiu oni neniam revenas kaj kie ne eniras la sunradioj", kaj, apogante sian blondan hararon sur la ŝultro de Tristano, haste alkuris apud lin.

Verkis kaj desegnis Ana María Ranero.

Solvoj de la rebusoj aperintaj en la pasinta numero:
sur la paĝo 18: Oficiala informo (in-formo)

Mi eniris la sorĉitan domon kaj vidis fantomon
(fanto; mo; n)


REBUSO-REBUSo-REBUSo-REBUSo-REBUSo-REBUSo-rebuso-r e b
u s o-rebuso-rebuso-rebuso-reBUSO-reBUSO-reBUSO-REBUSO-REBUSO
(la solvo aperos en la venonta numero)



Ci tio mem.

.....

ĜI EBLE RENASKIĜOS...



Rigardu la foton maldekstre de vi sur ĉi tiu paĝo. De dekstre la unua estas Rikardo (Malago-Madrido), la tria Mikel-Angelo, el Madrido, kaj de maldekstre li estas la unua, kaj la dua estas Ĉemo (Kordovo), kiu en la foto dekstre de vi estas la trio de maldekstre kaj staras apud Mikel-Angelo, la dua de dekstre; tamen

FOTAJ EL KORDOVO OKAZE

KIEL




la trio de dekstre ne estas Rikardo, sed ja Charles (Karlo; Valencio). Jen iliaj postenoj: Prezidanto - Mikel-Angelo; Vicprezidanto - Charles; Sekretario - Ĉeno; Estrarano pri Financoj - Rikardo. Ĉu vi bone komprenis? Ni komencu denove: rigardu la foton maldekstre de vi sur la alia paĝo...



LA OKA

HESTENDARO

D R B K ?



KINO:

PRJENTO CERBOŜTORMO

Jen sciencfikcia filmo, nuntempe spektebla en Hispanio. Ĝia temo en kadriĝas ĉi tiel: esploro teamo disvolvis manieron transkapigi sentojn kaj perceptojn, kaj surbendigi ilin. Post tio sekvas tipaĵo: kelkaj apogas la aferon, sed nur por siaj propraj interesoj; oni preteras la celojn de la teamo, kiu, kompreneble, ribelas. Kio sekvas, estas nura preteksto, laŭ mi, por esprimi la opinion, ke ia vivo daŭras


post la fizika morto. Belaj bildoj uzatas tiucele, kaj tio ne estas la plej eta atingo de la filmistoj. Eble iu ne ŝatos tian religiecan temon en scienceca etoso, sed la rezulto bonkvalitas. Belas la bildoj, kelkfoje psikedelaj; kaj beletas la pritrakto de la temo. Mi klarigu. Deirpunkto por kompreni la filmon estas, ke per ĝi oni celas gajni amasojn da mono. Ni ne povas do postuli tre bonan kvaliton artan, kiu forpelus la normalan publikon; sed tio tute ne signifas, ke mi vidis filmaĉon. Kvankam malriĉa, mi ne bedaŭras la elspezitan trezoron. Mi pasigis du agrablajn horojn, eĉ kvankam sola. Se cerbumema, vi certe eltiros materialon taŭgan por viaj mensaj amuzoj. Supoze, ke oni ne



pensas tro askete, la filmo povas instigi multajn direkti sian atenton al esoloraj terenoj, ĉu sciencaj aŭ ne. Amuzilo kaj instigilo, jen ĝiaj du ĉefaj meritoj. Amuza, ĉar kaptas la atenton tute ne monotone; instiga, ĉar multaj, supozeble, sin demandos "nu, kiel tio eblus, aŭ tio alia, aŭ...?". Kiel tio okazas en tiu filmo? Kompreneble, ke mi ne diros. Por scii, do, kion fari?

Vi trafis: elpoŝigu vian monon kaj...preĝu, ke ĝi estu tiel inda, kiel mi asertis. Sed ne timu: almenaŭ tiajn filmojn oni ne televidas ofte.

R. Filipino A. R.



(KLARIG' DE L' DESEGNINT': Mi ne spektis la filmon!)

PROVERBO

15

E·KOMUNUMOJ

(Verkis Georgo Kamaŝo,
ekstremadurano...)

Per ĉi tiu artikolo-
leto mi ne polemikos
pri la neceso esperan-
tigi geografiajn
nomojn. Por tiuj, ki-
uj, kiel mi, opinias,
ke nepras, mi prope-
nas esperantigojn de
la nomoj de la Hispa-
niaj Aŭtonomaj Komu-
numoj, kiuj esperan-
tigoj utilos almenaŭ
al HEJS. Satantoj u-
zu, kvankam ili ne
endu. Ĉe kelkaj vi
trovos paralelajn ne
paraleligindajn for-



mojn: skribu al HEJS-Juneco kaj esprimu viajn prefe-
rojn. Utilajn elpensutajn aŭ oportunajn elpensotajn
esperantigojn kunsendu se necese. Jen ili: (substre-
kitaj vortoj aperas en PIV)

- 1) GALEGIO, galegoj
- 2) ASTURIO, asturianoj
- 3) KANTABRIO, kantabrianoj
(kantabroj?)
- 4) EŬSKIO, eŭskoj
EŬSKARIO, eŭskaroj
EŬSKADIO, eŭskadianoj
VASKIO, vaskoj
BASKIO, baskoj (Aduriz^{laŭ})
- 5) NAVARO, navaranoj
- 6) ARAGONO, aragonanoj
- 7) KATALUNIO, katalunoj
- 8) KASTILIO-LEONO, kastilileonanoj
- 9) RIOHO, RIOJO, RIOŬO, -anoj
- 10) MADRIDO, madridanoj
- 11) EKSTREMADURO, -anoj
- 12) KASTILIO-MANĈO,
kastilimanĉanoj
- 13) VALENCIO, valencianoj
- 14) ANDALUZIO, andaluzoj
- 15) MURCIO, murcianoj
- 16) BALEAROJ, balearanoj
- 17) KANARIOJ, kanarianoj
- 18) CEUTO kaj MELILO
CEUTO, SEBTO (el la ara-
/ba), -anoj

LA SEP LERTAJ DANCANTAJ




17
EL POPOLA ĈINIO.

Jen "La sep lertaj dancantoj", rakonto el la dulingva libro "Cuentos iroqueses" ("Irokezaj rakontoj"), eldonita de Miraguano Ediciones (strato Hermosilla, 104, Madrido-9), kiu tre afable (kaj senpage!) permesis al ni la reprodukton de la desegnoj kaj la tradukojnde ĉi lastaj, pere de la hispanlingvaj tekstoj en la supre citita libro, kiuj fakte estas nur tradukoj de la bildoj de Tehanetorens, irokeza pentristo. Tial mi supre parolis pri libro "dulingva", ĉar la vera originalo estas la tehanetorensaĵoj mem. Espereble ĉi tiu rakonto tiel multe plaĉos al vi, ke la menciita rakontaro troviĝos sur via(j) librobreto(j).

Georgo Kamaĉo (Haŭ!...)

(ESPERANTIGIS G.KAMAĈO)



Antaŭ multaj vintroj,



kiam la Mohoka gento (la popolo de la Ŝtono)



ankoraŭ kampadis



ĉe la lago Keniatiio (Ontario),



sep infanoj volis formi sekretan societon.



Nokte



ili kunvenis ĉirkaŭ la fajreto de la Konsiliigo, kie la arbaro mortas apud la akvo de la lago, kaj dancis laŭ la ritmo de la tamburoj.



Unu tagon



la eta ĉefo sugestis bankedon



en la venonta Konsiliiĝo ĉirkaŭ la Fajro.



Ĉiu el la sep knaboj devus peti de sia patrino iom da manĝoj por la bankedo.



Unu petus maizsupon, alia cervoviandon, aliu paniklojn, kaj same ĉiu el ili.




La sekvantan tagon



Ĉiu petis de sia patrino la deziratajn manĝaĵojn, sed neniu ricevis la petitaĵojn. Ĉiu patrino diris al sia filo, ke hejme estas sufiĉe da manĝoj, kaj ke ili do ne bezonas manĝi tion arbare.



La junaj ĉasistoj sentis sin tre malfeliĉaj pro la neatingo de la manĝoj por la nokta bankedo. Ili malplenis mane kaj tristis kore.



Tiun nokton ili kuniĝis ĉe la lago, en sia sekreta danckloko.



La juna Ĉefo diris, ke ili dancu per ĉiuj fortoj.



Li diris al ili, ke ili rigardu ĉielon dum la dancado. Kaj ankaŭ, ke ili neniam rigardu dorsen, eĉ se la gepatroj krios reveni hejmen.



Dirinte ĉi tion, li prenis sian tamburon kaj frapante ĝin ludis povoplenan melodion, sorĉistan kanton.



La knaboj dancis kaj dancis, kaj dum ili moviĝis, ŝajnis, kvazaŭ iliaj koroj pezus malpli, kaj ili baldaŭ forgesis siajn problemojn.




La melodio plivigliĝis ritme kaj la knaboj tuj sentis siajn korpojn danci sur la ĉielo.



Iliaj gepatroj vidis ilin danci super la pintoj de la arboj kaj ordonis, ke ili revenu.



Unu el la dancantoj, kiu rigardis dorsen, fariĝis lumetanta stelo.



Post ne longe ankaŭ la ceteraj fariĝis
scintilantaj steletoj kaj restis pen-
de sur la Ĉielo.



Tial, kiam Mohoko vidas la stelojn de
la Plejado fajreti kaj danci nokte,
dum la vintraj malvarmoj, li diras:



"La junaj ĉasistoj dancas vigle ĉi-
nokte." Ili dancos ĉiam



super la irokezaj vilaĝoj. Kaj kiam
ili dancas ĝuste super niaj tegmentoj,



tiam venis la tempo de la Bankedo de
la irokeza Novjaro,



kio okazas dum la Novjara Novluno
(januaro aŭ februaro).




La irokezaj maljunuloj ankoraŭ hodiaŭ
rakontas ĉi historion al siaj nepoj
kiam ili vidas astron brili.

HEJS-FRŬNO

Mikangelus

← prezidantus

Madrida esperantistedo, ano de HEF kaj UEA, prezidanto de HEJS, nutranta sin per ĉiaspecaj bultenoj.




Albertus-Frankus
redaktorus →

Esperantistedo el Sevillo, kiu, esceptokaze kaj nekredeble, akceptis la postenon redakti la paĝon de HEJS en la revuo KONCIZE.

(En danĝero de estingiĝo).

22



GRABEGE!

- Antaŭ ĉio, ni devas informi via pri gravega novaĵo pri la 44a Hispana Kongreso de Esperanto. Ŝajne, estis eraro en la kalkulo pri la datoj de la kongreso ĉar en Seviljo oni konsideris la 7an de Julio kiel vendredon, sed tiu dato estas sabato. Do, atentu:

LA KONGRESO RELENCIĜAS LA VENDREDON, LA 6an DE JULIO, 1984!!!

LETEROJ AL LA **DIR.**:

Estimotigindaj kunredaktoroj: Leŭ cirkuler-letero al ni el Sevil' poŝtsendigita ni eksciadis, ke en la famkonindega Sevilurbo oni "konsideris la 7an de Julio kiel vendredon". Esperoblinde ili ne sammaniere prikonsiderados Sevilon kiel Milvokion, junulojn kiel monriĉulpersonetojn ŝarĝitazenbestaĉojn nek ĉiujn kiel publikparolkapablinovajn esperantomovadkongresemantojn.

Prialdanketon kaj ĝisrevidadiaŭon!

Averto Anglo (Hejspalis).

ERARO

Kie tekstas

devas teksti (sur ĉi paĝo)

GRABEGE!

GRABEGE!

Gis



**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**

*HEJSaj kaj eksterHEJSaj
esperant-istoj kaj -anoj en Kordovo*